

Por ECI (Europa civitana Iniciativo) necesas 1.000.000 da subskriboj el minimume 7 diversaj EU-landoj; kolektenda ene de 12 monatoj. Tamen indas subskribi rapide, por atingi la kvanton sufiĉe frue. Bazajn informojn en Esperanto pri ECI vi trovos en vikipedio - kaj de tie estas ligoj por legi detale en 18 lingvoj.

https://eo.wikipedia.org/wiki/E%C5%ADropa_civitana_iniciato

= = =

2020-12-26 **Foti stelojn malgrau chirkauanta lumo-poluado - ekologia efiko de noktaj lumoj**

AVENO 33 (2009) enhavis artikolon pri „lumo-poluado de la chielo“ - rilate ekologio, kaj foti stelojn ktp.

Iu serĉilo trovis tiun artikolon kaj mi ricevis inviton viziti pagharon de astro-fotistoj:

<https://nightskypix.com/bortle-scale/>

Kiu shatas foti noktajn chielo-objektojn eble konas la t.n. skalo de Bortle - kiu indikas kiajn objektojn oni povus vidi je lumigita nokta chielo. Jen diversaj ligiloj - ankaŭ temas pri ekologio:

(Esperanto) http://www.verduloj.org/33/moz_eko.htm

(germana) <http://www.lichtverschmutzung.de>

(angla - tutmonde) <https://www.globeatnight.org/> , <https://britastro.org/dark-skies/>

= =

2020-12-19 **Mineraloj el rubo**

Kiel jam kalkulis la raporto „Global 2000“ de 1977, nia tutmonda ekspluado de mineraloj kaj fosiliaj energio-fontoj (karbo, nafto, uranio) havas limojn. Krome la ekspluatado ofte kausas poluadojn - ekzemple la prilaboro de Bauksito al aluminio. Tial indas uzi ilin shpareme, kaj recikli laueble. Kion oni jam kutime faras che metaloj kiel fero kaj kupro, nun pli kaj pli necesas ankaŭ che aliaj mineraloj - ekzemploj:

Zinko - ankoraŭ ne tre multekosta, tamen en Svedio oni uzas metodon de KTI kaj eltiras zinkon el la flugcindro de rubo-bruligfornoj;

Fosforo - tre grava por la agrikulturo - je kelkaj deponejoj (ekzemple sur la insulo Nauru) oni jam vidas la limon; kaj landoj kiu ne havas propran fosforo-deponejojn serĉas alternativojn; t.s. uzi la feĉon el la klarig-instalajhoj kiu kutime enhavas fosforon; teorie eblus rekte redoni tiun feĉon al la kampoj, sed ili ofte ankaŭ enhavas toksajn metalojn. Post la bruligo de tiu feĉo oni povas ekspluati la fosforon.

(pri zinko) <https://www.sonnenseite.com/de/wissenschaft/zink-aus-muellverbrennungsanlage-gewinnbar/>

(ghenerale) https://de.wikipedia.org/wiki/Urban_Mining

--

2020-12-19 **La Ninja - kausos sekecon en Afriko - agrikulturaj problemoj**

La veter-fenomeno La Ninja dum la sekvaj jaroj kausos sekecon je orienta kaj centra Afriko. En la lasta jaro inundoj kaj gigantaj amasoj da akridoj kausis grandajn perdojn da nutrajho. Se nun venas sekeco - denove mankos nutrajho. Oxfam kalkulis ke mankos nutrajho por ghis 50 milionoj afrikanoj.

<https://www.sonnenseite.com/de/umwelt/starkes-la-nina-koennte-in-ostafrika-millionen-menschen-in-den-hunger-treiben/>

(jen en la angla, ankaŭ en la franca kaj hispana): <https://www.oxfam.org/en/press-releases/climate-fuelled-la-nina-east-africa-will-drive-millions-hunger>

= =

2020-12-10 **Olkiluoto 2 interne radioaktiva**

En Olkiluoto - proksime de Rauma - okazis radioaktiva poluado en la interno de la dua reaktoro. Lau informoj la problemo estas solvita, kaj neniu radioaktiveco atingis al la ekstero.

<https://de.euronews.com/2020/12/10/signifikanter-zwischenfall-hohe-radioaktivitat-im-akw-olkiluoto-in-finnland>

La tria reaktoro, nova EPR, estas delonge en konstruado. Oni esperas komencon de hejtigo en 2021. Raportoj en pluraj lingvoj:

<https://de.euronews.com/2020/12/10/signifikanter-zwischenfall-hohe-radioaktivitat-im-akw-olkiluoto-in-finnland> ; - - -

2020-12-10 **Mochovce 3 kun 22 diversaj sekureco-mankoj**

raporto de IAEA montras gravajn mankojn rilate sekureco. Ricevi la oficialan raporton estis bremsita.

<https://www.global2000.at/news/mochovce-iaea-bericht?>

--

2020-12-10 **Cianido en chehha rivero Becva (Moravio).**

mortis ch. 40 t da fishoj. Oni supozas ke DEZA, kemio-fabriko de Agrofert, la konzerno de la chehha chefministro Babis [babish], kaŭzis la poluon. Pro tio malfacilas trovi la veron.

<https://www.tagesschau.de/ausland/europa/oeko-gau-tschechien-101.html>

komento de Petro: Babiš (Babis) ne estas ĉeĥa prezidento, sed ĉefministro [dankon por tiu korekto !]. Cetere, li estas slovako (kvankam verŝajne jam kun la ĉeĥa ŝtataneco) kio estas ankaŭ iam rimarkebla en lia parolado, kaj oni diras, ke li estas "la plej riĉa slovako, kiu aĉetis Ĉeĥion", kio verŝajne estas troigo. Ĉar li posedas multajn periodaĵojn, lia influo estas enorma, tial li, malgraŭ la skandaloj, estas laŭstatistike la plej populara politikisto, kiu samtempe havas plej multajn akrajn kritikantojn kaj malamikojn.

= =

2020-12-07 **Kial mortas tro da insektoj - dokumenta filmo**

Jen filmo (44 min) kiu montras la diversajn minacojn por insektoj:

industria agrikulturo, tekniko*, monokulturo, gazonoj, troa fekundigo, pesticidoj, tro da lumoj; sed ankaŭ montras kio eblas por restigi insektojn - plejeble multaj.

Se mankas insektoj estas malbona fekundigo de frukto-floroj (pomoj ktp.), kaj multaj bestoj bezonas ilin por vivi (birdoj, ranoj, ...).

Videbla ghis 1-a de Marto 2021; en la angla, franca, germana, hispana kaj itala lingvoj:

<https://www.arte.tv/de/videos/097886-007-A/der-stumme-sommer/>

Komento AVE/mw: se oni kolektas insektojn (kaj fakte mortigas ilin por kalkuli kaj montri) en la sama loko chiun jaron, eble ankaŭ tiel oni reduktas la nombron da insektoj, ĉar ne chiuj estas tre oftaj.

*) privataj ĝardenoj ofte havas gazonon kiun oni falchas ne plu per falĉilo sed intertempe per razilo kun rapide rotacianta tranchiloj - la sama ankaŭ ĉe la moderna herbejokulturo. Tiuj plurfoje tranchas la saman lokon, eĉ ŝuchas insektojn de la grundo al la nivelo kie okazas la tranchado. Tiamaniere multaj insektoj estas daŭre mortigataj ĉar la razado okazas plurfoje dum la jaro. Kompare al tio 2 - 3 foja falchado per unufoja tranĉo (kiel pere de serpo) nur malmulte andanĝerigas la insektojn - eĉ donas al ili multajn florojn.

= =

2020-11-29 **Raporto el Altamira, Brazilo**

jen ligilo al raporto el Brazilo, tradukita en Esperanton, kiu pledas reale pri incendioj, pri malrespekto de indigenaj rajtoj: <https://eo.globalvoices.org/2020/11/9131/>

Dankon al Herman Deceuninck: Naturamikoj sur verdaj vojoj:

<https://eo-naturamikaro.webnode.nl/>

Komento de AVE/mw pri Amazonio: mi legis ke eble jam oni atingis la t.n. shanghigho-punkton pri perdo de pluarbaro, kiu iĝos savano (maldensa arbaro). Tio ankaŭ signifus ke la akvo-transporto pere de kaj super la arbaro ne plu okazos; tio rezultos ke la marĉa regiono Pantanal ne plu ricevos tiom da pluvo ...

= =

2020-11-09 **Ekologia katastrofo - pri Santa Barbara insuloj antaŭ Kalifornio**

8 ekologiaj paradizoj kun pluarbaroj estis shanghitaj en nuda roko-dezerton (Santa Cruz), alia en stepon. Jen ekzemploj kio okazas kiam la homo malsaghe traktas la medion. Importi brutaron (ŝafojn) detruis la vegajhon, erozio ... grundo perdighis.

Jen 3 filmoj (chiu ch. 40 min) en la franca kaj la germana kiu montras: la paradizon (antaŭ 500 jaroj), la detruon, la projekton restauri la paradizon.

<https://www.arte.tv/de/videos/050337-001-A/die-channel-islands-vor-kaliforniens-kueste-1-3/>

<https://www.arte.tv/de/videos/050337-002-A/die-channel-islands-vor-kaliforniens-kueste-2-3/>

<https://www.arte.tv/de/videos/050337-003-A/die-channel-islands-vor-kaliforniens-kueste-3-3/>

--

2020-11-10 **Trump permesas detruon de Tongass praarbaro en Alasko**

Tongass estas pluarbaro en la moder-temperaturo zono, en la sud-okcidenta parto de Alasko, inter la Pacifiko kaj la limo al Kanado; Juneau, la ĉefurbo de Alasko situas en la norda parto de tiu regiono. Ĝi kolektas grandan kvanton da CO₂, estas hejmo de multaj bestoj kaj ankaŭ fishoj, kiel la Pacifika Salmo. Se oni detruas la arbaron tiuj perdas sian hejmon. Diversaj indigenaj etnoj vivas tie. Trump permesis uzi/forhaki 3.8 milionoj hektar de tiu pluarbaro. Pli pri tiu pluarbaro en Vikipedio.

Jen la peticio - surbaze de: <https://www.care2.com/>

<https://www.thepetitionsite.com/de/407/395/430/?z00m=32592359&redirectID=3058451797>

2020-11-08 **DDT-poluado je marbordo de Kalifornio**

Ne nur Rusio havas problemojn pri ruboj de toksaj/venenaj agro-kemiaĵoj - dum Oktobro mi raportis pri Kamchatko; jen ekzemplo el Usono:

DDT estas toksa pesticido do danĝera ke ĝi mortigas birdojn kaj fiŝojn kaj tre malutilas al homa sano. Estis malpermesita en USONO en 1972. Tamen, montriĝis, ke la plej granda produktanto de DDT en Usono forigis la toksan kemiaĵon simple ĵetante barelojn en la oceanon laŭlonge Katalina Insuloj antaŭ la marbordo de Los Anĝeleso! Eĉ pli malbone: ĉar la bareloj ne sinkis, oni trapikis ilin; sekve malrapide eliris toksa ŝlimo dum jardekoj, venenis bestojn kaj homojn. Inter 1947 kaj 1961 miloj da bareloj estis ĵetitaj tie en la maron, tie tre profunda. Oni plurfoje promesis elmeti la barelojn, sed ghis nun tio ne okazis.

Bonvolu subskribi la petskribon kiu postulas la kompletan purigadon ! DDT estas tiel nedetruibla. Esplorado montris altan koncentriĝojn de DDT. Ghi konstante supreniras laŭ la manĝoĉeno. De la fitoplanktono, fiŝoj, balenoj. Marleonoj kaj delfenoj precipe suferas, montras sanproblemojn kaj mortas pli frue. Kompreneble DDT ankau eniras en la nutroĉenon de birdoj: Kalifornia bruna pelikano, kalvaj agloj, kaj peregrinaj falkoj. Ni devas meti publikan premon sur tiu temo kaj postuli la purigadon; ekzistas sciencistoj kun ideoj pri kiel mapi la problemon kaj ripari ĝin.

Bonvolu subskribi la petskribon kiu postulas ke EPA (la usona oficejo pri medio-protektado) plenumi sian taskon kaj elmetu ĉi tiun toksan ŝlimon el la oceano!

(traduko subtenita de traduku.org)

<https://www.thepetitionsite.com/540/024/662/there-are-half-a-million-barrels-of-ddt-a-toxic-chemical-leaking-off-the-l.a.-coast/>

Tiu retejo prezentas peticiojn en 9 europaj lingvoj: <https://www.thepetitionsite.com>

= = =

2020-11-07 **unua atomreaktoro en Belorusio - „donaco“ de Rusio**

Jam necesis intershanghi mezur-sistemojn.

(2020-11-10 laŭ novajhoj de deutschlandfunk.de)

Nur 40 km de la litova ĉefurbo Vilnius, ĉe Ostrovets. Konstruita malgrau protestoj de Litovio.

Vladimir Slivjak, <https://ecodefense.ru/>, (kelkaj artikoloj en la angla au germana), kritikis ke - kontraue al la pretendoj - la jam konstruitaj en Rusio 3 sam-tipaj WWER 1200 montris problemojn de la malvarmiga sistemo kaj kreis poluadojn. Krome: la kostoj de kurento el tiu reaktoro estus pli altaj ol de suno kaj vento. Litovio decidis ne aĉeti kurenton el Belorusio.

Jen artikolo en la germana: <https://www.tagesschau.de/ausland/belarus-akw-101.html>

2020-10-30 **Food Forest**

<https://www.youtube.com/watch?v=VTwK0TgaYog&feature=youtu.be>

montras en 5 minutoj kio gravas por agro-forstado.

de <http://www.seedsaverskenya.org/>

2020-10 **UN kaj medioprotektado**

la organizajho UNEP (medio-programo de UN), situas en Nairobi; ili eldonas novajhleteron pri mediaj temoj, certe ankau enkadre de la 17 CDE.

<https://www.unep.org/news-and-stories> ; (dankon al Herman - Naturamikoj)

= =

2020-09 17 **Celoj de Dauripova Evoluo en Esperanto-versio**

jen informo de Herman kaj de Probal pri publikigo de chi-tiu grava programaro de UN, je kiu UEA partoprenas, kaj fakte akceptas la delonge postulatan de AVE temon „Daurigeblo“.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Celoj_por_Da%C5%ADripova_Evoluigo

kaj ke de tie la leganto povas facile pluri al la tre grava, sed ne suficxe rimarkita (aux uzata, aux diskonigata) dokumento.

<http://www.esperantoporun.org/wp-content/uploads/Gvidilo-al-la-17-celoj-por-dauripova-evoluigo-de-UN.pdf>

Multaj homoj sxvitis por kiel eble plej perfektigi tiujn dek sep tradukojn de sufcixe bonaj dokumentoj. ili meritas pli da diskono. bedaŭrindas ke la esperanta popolo cxesis entuziasmi pri la UN-familio pro la manko de tiea rekonigxo de specife la esperanta afero.

Multaj el ni en esperantujo ne vere komprenas ke ni ne povas rikolti aliancojn kiujn ni ne forgxas per propra scivolemo kaj laboro. alimovadanoj venos proksimen al ni nur se ni aprezos la sendependan gravecon de tio kion ili faras.

La gvidilo estas havebla libroforme de Mondial, Novjorko; kaj certe de chiu bona libroservo esperantista, 113 p., kovrilo montras la 17 multkolorajn piktogramojn :)

Komento AVE/mw: tre bona iniciato de Humphrey kaj Rakoen; mi verkis por AVE pri #12.

Sed realigi ghin enkadre de per-Esperanto-Agado estos malpli facile. Kelkaj samideanoj, inter ili AVE kiel grupo, jam aktivas en chi-tiaj laborkampoj.

Jen nia konciza prezento pri tiu temo, sekvante la eniran paghon „17 CDE“ sur:

<<http://www.verduloj.org/Per-Esperanto-Agado.pdf>>

= =

2020-10-12 **Katastrofo sur la borda regiono de Kamchatko - Rusia registaro nebuligadas**

60 km largha borda zono de chi-tiu rusa duoninsulo en la Pacifiko estas morto-zono por chiu vivantajhoj !

Tie trovighas la natur-rezervejo Kronozki; rusa filio de Greenpeace (VerdPaco) rakontis ke plonghisto trovis morto-zonon ghis la profundo (15 m) laulonge de tiu bordo, kaj sur la bordo amasighas kemie vunditaj korpoj (por ia lezivo au simila veneno).

Ili supozas ke estas granda rubejo de dangheraj kemiajhoj (i.a. oni enterigis pli ol 50 t da DDT en tiu regiono) kiu difektighis kaj ellasas la morton en la maron.

Bedaurinde - kaj denove - la rusa registaro nebuligas la aferon.

<https://www.tagesschau.de/ausland/tiersterben-kamtschatka-101.html>

Komento de AVE/mw:

Tiu kontinua sinteno de la rusa registaro - mensogi, nebuligi, ne diri la veron - estas tre bedaŭrinda: ... atako de Krimeo kaj de orienta Ukrainio pere de ne-regulaj soldatoj, mortigo kaj venenigo de opoziciuloj (Nemcov), ankau eksterlande en Britio kaj Germanio kaj plej aktuale la venenigo de Alexej Nawalny en Siberio pere de malpermesita milit-veneno - la ruzaj rusoj (en la registaro) pretendas ke tiu venenigo povus okazi ie ajn, ekzemple ankau en Germanio - sed fakte ja la aviadilo (dank al la gvidantoj) tuj alterighis en Omsk, kie oni unue malhelpis la transporton (morta korpo tie ne farus problemojn) al Berlino, kie li estis savita en la malsanulejo Charite.

<https://www.tagesschau.de/ausland/nawalny-interview-101.html>

= =

2020 **Hidrogeno forlasas la Teron - en fora estonteco mankos akvo**

Char H estas la plej malpeza atomo kaj H₂ la plej malpeza molekulo ghi povas forlasi la adherecon de nia planedo Tero. Oni kalkulis ke la atmosfero de Tero etendighas ghis 600.000 km - en tiu ekso-sfero nur trovighas hidrogeno-molekuloj (au atomoj?) ; kaj de tie ili foriradas en la kosmon.

<https://www.scinexx.de/news/geowissen/erdatmosphaere-reicht-bis-zum-mond>

Kosmo-sciencistoj kalkulis en 2012 ke chiu-jare 100.000 tunoj da hidrogeno foriras en la kosmon.

<https://www.spiegel.de/wissenschaft/natur/wasserbilanz-die-erde-hat-ein-leck-a-819868.html>

Ni kalkulu kiom da akvo enhavas tiom da hidrogeno:

H₂ + O > H₂O, sekve 2g H₂ + 16g O₂ = 18g H₂O

t.s. ke perdo de 2g H₂ ekvivalentas al potenciala perdo de 18 g akvo.

Kaj 100.000 t ekvivalentas al 900.000 t akvo; t.e. volumeno: 100 * 100 * 90 m³

Post 53.000 jaroj nia Tero perdas la akvokvanton de la Lago de Konstanco: 48 km³ .

Mi esperas ke la kalkulo estas sen eraroj.

Se oni pripensas ke tutmonde oni evoluas la hidrogenan teknikon por anstataui nafton kaj ter-gason, oni povas imagi ke multe pli da hidrogeno evaporighos en la kosmon. Sekve necesos atentigi ke ne okazos pli da perdoj. Kompreneble ne eblas prognozi en tiom foran tempon.

Se iu scias aliajn detalojn pri tiu temo, mi volonte pripensos ilin.

- - -

2020-09-30 **Foriro de mono - impostaj oazoj**

la Verda Frakcio en la EP postulas pli egalan kaj rigoran imposto-skemon en tuta EU.

Grandaj konzernoj prefere „loghas“ (por aktivi ene de EU) en Luksemburgo, Nederlando au Irlando, ĉar tie ili pagas ridinde malaltajn impostojn. Por financi EU necesas pli da imposto; aparte post la nunaj bezonoj stabligi grandajn kaj malgrandajn entreprenojn (de konzernoj ghis unuopuloj, artistoj ...)

Jen ilia studo koncerne konstruajho-konzernojn, kiu estos diskutata en la nova komitato pri impostoj:

https://sven-giegold.de/wp-content/uploads/2020/09/200929_Taxing-real-estate-income-the-role-of-Luxembourg_final.pdf

= =

2020-09 **Lamento de la Tero - kanto de Manuel**

Li skribis: „Mi ŝatus se eblus preparoli mian videkanton“

retadreso <emanrovere@libero.it>

(en Esperanto) https://youtu.be/csRwraS5_lk

(en la angla) <https://youtu.be/ps78J-F7exs>

Koran dankon, Manuël :) por via tiom afabla instigo al chiuj homoj por pli bona konduto kun la naturo.

--

2020-09 **chiam pli da arbaro-fajroj en la iama akvo-paradizo Pantanal**

Pantanal estas regiono kiu apartenas kaj al Bolivio, Brazilo kaj Paragvajo. Granda parto de tiu regiono konsistis el tereno kie intershanghas inundoj kun seka sezono. Pro tio estas tre valora biosfero. Grandaj partoj estas protektitaj areoj kaj jam ek de 1993 sub la konvencio de Ramsar.

Ek de ĉ. 10 jaroj okazas pli kaj pli severaj arbaro-fajroj; parte pro homa incendio por gajni novajn kampojn. Sed la plej granda minaco venas de la kontinua mal-arbarigo en la najbara Amazonio. Ĉar de tie venis la humideco: la pluvarbaro de Amazonio pludonas (transportas) la humidecon de la Atlantiko ghis al la Anden-montaro; de tie la nuboj shanghas la direkton al sudo, kaj zorgis por tiuj grandskalaj inunditaj terenoj. Nun, ekde 2017 venas malpli kaj malpli da pluvakvo, pro tio la sekecaj intervaloj dauris chiam pli longe. Seka aero kaj altaj temperaturoj, kune kun homaj incendioj kulminis 2020 en la plej granda kvanto da bruligitaj arbaroj en Pantanal. Mortis multaj sovaghaj bestoj, inter ili kajmanoj kaj papagoj; kaj multaj savitaj mambestoj havis brul-vundojn je siaj piedoj (ktp.). Jen detaloj en Vikipedio kaj de geamikoj de Brazilo:

<http://pantanalportal.de/pantanal-news/braende-im-pantanal-bedrohen-fortbestand-seltener-tiere-wie-hyazinth-ara/>

<https://de.wikipedia.org/wiki/Pantanal>

--

2020-09-11 **eksporto de malpermesitaj pesticidoj el Europo**

la svisa NRO Public Eye (publika okulo) raportis kaj kritikis ke EU (inkluzive de Svisio) eksportis 81.000 tunoj da tre dangheraj pesticidoj kiuj jam estis malpermesitaj ene de EU. Triono venis de Syngenta (intertempe filio de china konzerno) el Svisio. Aliaj firmaoj: Alzchem, Bayer, BASF. La permeso estis de EU. La eksporto iras al evolu-landoj kie kontroloj mankas au ne sufichas.

<https://www.publiceye.ch/de/themen/pestizide/verbotene-pestizide-eu>

= =

2020-08-28 **Malpermesi unuvojajn plastajhojn**

WeMove kolektas alvoko-subskribojn al la Europa Komisiono, kaj aparte al komisaro por Medio kaj Oceanoj, Virginijus Sinkevičius por postuli efikan malpermeson de unuvoja plastajho, ĉar de tiu tro multe poluas la medion.

Jam 2017 EU akceptis la postulon malpermesi unu-vojan plastajhon. La lobiado nun postulas esceptojn de la legĥo, sekve de tio la poluado daurigos.

Jen la ebleco subteni la alvokon - la informo estas en 6 EU-lingvoj:

www.act.wemove.eu/campaigns/einwegplastik-stoppen

Kaj jen prelego de AVE/mw pri videblaj kaj nevideblaj dangheroj de plastajhoj en la natura medio:

www.verduloj.org/akvo.htm

--

2020-08-28 **Nafto Poluado tutmonde - la ligiloj (teksto en la germana) montras fotojn:**

En la lastaj 4 monatoj atingis nin informojn pri katastrofaj nafto-eliroj kiuj poluis la naturan medion:

- Siberio: ni preskau jam forgesis la katastrofan poluadon de Ambarnaja kaj granda lago Pjasino, pro rompita dizelo-cisterno - fluis 21.000 tunoj da dizelo en la naturon. Ros-prirod-nadsor (la naturprotektada autoritato postulis (libervolan ?) pagon de preskau 2 miljarde Euro de la firmao Nornikel.

<https://www.tagesschau.de/ausland/oelunfall-sibirien-103.html>

- Ekvadoro: rompita nafto-duktoj eligas nafton en la Amazonas-regionon

La registaro ne agadis malgrau informoj, ke rompo de barajho je akvofalo St. Rafael povus detru la nafto-dukton de shtata firmao OCP. Tio fakte okazis je la 20a de Aprilo, sekve de tiu rompo ch. 1,5 milionoj litroj da kruda nafto fluis en la Coca-riveron.

www.sonnenseite.com/de/umwelt/ecuador-die-stille-umweltkatastrophe-im-amazonas.html?utm_source=%3A%3A%20Sonnenseite%20Newsletter%202025.%20Juli%202020%20%3A%3A&utm_medium=E-Mail&utm_campaign=Newsletter

- Rugha Maro: antau la bordo de Jemeno trovighas la cistern-shipo „Safer“ kiu enhavas pli ol miliono litroj da nafto. La shipo estas kaduka. Pro la milito en Jemen neniu volas riski zorgi pri la nafto. Se tiu finfine rompighas okazos giganta poluado - oni diris, ke pli granda ol je „Exxon Valdez“ (1989 antau la bordo de Alasko). Lise Grande, UN-Koordinatorin pri humanitara helpo diris al la informo-provizanto AFP: „Okazus humanitara katastrofo, char tie 100.000 familioj vivas de fishkaptado, krome estos problemo pri trinkakvo, char tie granda parto venas el la sensaligita mar-akvo.

www.sonnenseite.com/de/umwelt/eine-million-barrel-l-bedrohen-das-rote-meer.html?utm_source=%3A%3A%20Sonnenseite%20Newsletter%202025.%20Juli%202020%20%3A%3A&utm_medium=E-Mail&utm_campaign=Newsletter

- Mauricio: fine de Julio japana cistern-shipo „Wakashio“ sub china kapitano malleghes enveturis en regionon de koralrifoj, tie la shipo estis haltigita kaj truigita, sekve de tio elfluis la mazuto (peza kaj malpura dizelo) por la motoroj en la maron. entute temas pri 3.800 tunoj. Bonshance ke la shipo ne transportis nafton. Multaj homoj okupighas cherpi la mazuton el la akva-surfaco. Temas pri ekologia katastrofo, al kiu sekvos ekonomia, char tiu regiono estas tre shatata de turistoj. Ghis la 12a de Augusto oni sukcesis elpumpi duonon de la enhavo. La shipo rompis. La antaupa parto de la shipo mallevighis. Nun - 26a de Augusto - oni trovis mortajn delfenojn kaj balenojn, kaj ankau malsanajn delfenojn. Oni supozas ke la nafto-poluado, au alia venena enahvo de la detruita shipo kausis ilian morton.

www.tagesschau.de/ausland/mauritius-oelpest-103.html

www.tagesschau.de/ausland/mauritius-wale-delfine-101.html

= =

2020-08-18 **Peticio al EU - kontrau Mercosur**

char tiu kontrakto subtenas la for-bruligon de Amazonio.

Por atingi 500.000 da subskriboj necesas ancorau ch. 75.000

Se vi estas civitano de EU kaj ancorau ne subskribis, bonvolu fari nun au sendu al aliaj homoj.

Koran dankon - vi povas legi detalojn pri tiu temo en pluraj europaj lingvoj:

<https://act.wemove.eu/campaigns/no-to-mercosur>

= =

2020-08 **Klimata situacio**

Verschlimmert werde die Situation durch die künstlich herbeigeführte Entwässerung vieler Wälder, etwa durch Entwässerungsgräben. Der WWF fordert daher eine umfassende Förderung von Laubmischwäldern, wie sie natürlicherweise in Deutschland vorkommen und eine naturnahe Waldwirtschaft inklusive Maßnahmen zum Wasserrückhalt. Laubmischwälder erhöhen den Grundwasserspiegel, sorgen für ein kühleres Waldklima und beugen Bränden vor, so die Umweltschützer.

Ausgewählte Fakten aus der Studie:

- Europa: Europa „mediterraniert“ sich zunehmend. Große Waldbrände sind nicht mehr die Ausnahme, sondern die Norm, selbst in den gemäßigten Klimazonen, wo insbesondere angepflanzte Kiefernforste brennen.
- Nördlicher Polarkreis: die Brände erwärmen den Permafrostboden, der dadurch noch schneller auftaut. Darin gebundenes CO₂ und Methan wird freigesetzt, was wiederum zu einer weiteren Erwärmung führt.
- Südostasien: 99 Prozent der Brände sind menschlichen Ursprungs und stehen im Zusammenhang

mit Entwaldungsprozessen und Veränderungen in der Landnutzung für Palmöl, Papier und Zellstoff.

- Zentralafrika: 70 Prozent der Brände weltweit konzentrieren sich auf dem afrikanischen Kontinent.
- Kalifornien: Fast 100.000 Hektar wurden in 2019 verwüstet, mehr als 200.000 Menschen mussten evakuiert werden.
- Australien: Mehr als zwölf Millionen Hektar brannten innerhalb von vier Monaten ab, mit einer großen Zahl von Todesopfern und enormen Umweltschäden. In einem der heißesten Jahre seit Beginn der Temperaturlaufzeichnungen wurden neben Steppe und Grasland auch Wälder der normalerweise feuchteren gemäßigten und subtropischen Region großflächig verbrannt.

Info dank' al Franz Alt, www.sonnenseite.com, jen la originalo: www.wwf.de/2020/juli/planet-in-flammen/
= =

2020-07-29 **Regajneblaj energioj en Usono - pliighas**

Malgrau la klopodoj de la lobio de karbo-, nafto/gaso- kaj atomenergio la provizo-firmaoj pli kaj pli investas en regajneblajn energiojn el vento kaj suno - inkluzive de grandaj baterioj por stoki la energion. Jen la ligilo - en la angla:

www.ieefa.org/ieefa-u-s-utilities-are-now-skipping-the-gas-bridge-in-transition-from-coal-to-renewables/
- -

2020-08 **Geopolitiko, remalkovrita fako**

Dum la Virtuala Kongreso de UEA enkadre de IKU prelegis Javier Alcalde pri Geopolitiko, evidente tre grava fako por ne nur kompreni la mondon, sed ankaŭ trovi pli taugajn manierojn mastrumi ĝin.

Jen la resumo:

Dum jarcentoj Francio kaj Germanio batalis unu kontraŭ la alia. Temas pri du landoj kun ampleksa teritorio kaj multnombra loĝantaro, kiuj dividas landlimon. Ambaŭ celis fariĝi la regiona ĉeflando de Eŭropo. Tiel militoj inter ili okazis kvazaŭ nature, ne povus esti alie. Tamen en alia mondoparto, du aliaj landoj kun ampleksa teritorio kaj multnombra loĝantaro, kiuj simile dividas landlimon, preskaŭ neniam batalis unu kontraŭ la alian. Temas pri Barato kaj Ĉinio. Kredeble ambaŭ kapablas fariĝi la regiona ĉeflando de Azio, sed grandaj militoj inter ili ne okazis. Kiel tio klarigeblas? Geografio proponas pripensigan respondon. Verŝajne, se la plej alta montaro de la mondo situus inter Francio kaj Germanio, la eŭropa historio estus malsama. Eble, se ĝi ne situus inter Barato kaj Ĉinio, la azian historion karakterizus pli alta nivelo de perforto. Kiel sendependa fako, geopolitiko kreiĝis fine de la deknaŭa jarcento en Germanio, kaj efikis sur la agadon de la tiutempaj registaroj. La ideo de ŝtato kiel vivanta organismo, kiu havas bezonojn laŭ la naturaj leĝoj, iĝis tre influa. Kontraŭe, post la dua mondmilito oni ligis ĝin al la nazia ideologio, kaj dum jardekoj la tuta fako malaperis de la publika debato. Geopolitikaj analizoj fariĝis denove popularaj en la dudekunua jarcento, kiam pluraj geografoj, politiksciencistoj kaj militaj strategiistoj rekuperis ĝin. Pere de ekzemploj, historie kaj geografie diversaj, la prelego celas konatigi la partoprenantojn kun la ĉefaj teoriaj elementoj, kiuj kuŝas malantaŭ tiu pensmaniero.

Dankon al la organizantoj kiuj prezentis chiujn prelegojn senkoste en la reto - sed kompreneble petas subtenon: (pagho 60pp): www.iku.trovu.com/pdf/iku_libro_2020.pdf

= =

2020-06-30 **Gene-Drive - efika ekstermo de organismoj - tro danĝera !**

La ideo estis ekstermi kulojn, ĉar tiuj etendas malsanojn, ekz-e malarion - sonas bone.

Sed la tekniko „Gene-Drive“ (heredi genetikan informon) havas ne-kontroleblajn konsekvencojn, ĉar tiu hereda informo povas salti de kulo al papilio; do, ne nur kuloj finfine ekstermighos sed ankaŭ papilioj. Vi eble rememoras la poemon de Goethe pri la „Zauber-Lehrling“ (profesi-lernanto).

www.sciencedaily.com/releases/2019/12/191219142646.htm

Estas sciencaj ekkonoj ke la bakterio *Wolbachia* povas transdoni genojn inter diversaj insekto-specioj. www.ncbi.nlm.nih.gov/pmc/articles/PMC4882834/

Ghenerala scienca klarigo pri tiu tekniko (de, en): www.stop-genedrives.eu/en/gene-drives/

Kaj jen la apelacio al la EU-komisario pri sano kaj sekureco de nutraĵoj:

Bonvolu bloki la liberan uzon de heredigaj teknikoj - kaj postuli tutmondan moratorion (pauzon por esplori pli detale la konsekvencojn) enkadre de la UN-konvencio pri biologia multeco (CBD):

Peticio en 6 europaj lingvoj: www.act.wemove.eu/campaigns/gene-drive-moratorium-DE

Wemove (ni movas) estas EU-vasta asocio por transporti civitanajn skrupolojn en la EU-parlamenton.

= =

2020-06 **Albanio direktas al naturprotektado**

Laux mi la sola bona ago post 2013 estis la moratorio de la cxasado. Tio savis nian fauxnon.

Cetere ekde kvin jaroj funkciis ka urbodoma kampanjo de la cxefurbo por planti du milionojn da arboj.

(Koncize de Bardhyl Selimi)

--

2020-05 **Sennaciulo raportas pri kolapsologio**

la kajero de Sennaciulo (Marto-Aprilo 2020), organo de SAT, pritraktis la temon „kolapso“.

Unu el la kritikaj parametroj estas la kvanto de homoj. Nia populacio devas atingi stabilan nivelon - por ne atingi apokalipson.

Tre detala artikolo pri la multaj minacoj, pri kiuj necesas tauga politiko, kaj sinteno de la tutmondaj civitanoj; i.a. necesus shanghi agrikulturon kaj nian nutradon, malpli da viando, kaj pli da proteino el legomoj kaj eble insektoj. Ankau sciencfikcie temis pri tio. Recenzo pri la pli detala libro „Kollaps“ de Jared Diamond kompletigis la temaron.

Koncize aperis kritiko de H-J Fell (Verd-partia eksa germana parlamentano) kontrau la nuna „Geen Deal“ (verda interkonsento) de la Europa Komisiono. Ghi tute ne sufichas por atingi la bezonatajn celojn: redukti la CO2-eligon; same mankas la celo atingi agrikulturon sen venenigo la grundon, akvon, nutrajhon kaj naturon (insektoj k.s.).

Komento AVE/MW: la pashtado de bruto-bestoj: shafoj, kaprioj, bovoj, chevaloj ktp. estas ekologio-afabla se temas pri terenoj kie estas malfacile kulturi legomojn. De agroj kutime rapide perdighas humuso, dum tiuj tempoj kiam mankas kreskajhoj. Do, pashto-kulturo povas resti sur nia tero. Se iam eblos nutri chiujn homojn salubre (bone-kvalite) sen bestoj, tiam oni povus redoni tiajn terenojn al la sovaghaj bestoj kaj insektoj. La encikliko de Papo Francisko „Laudato si“ (2015) - plejparte tre bone - asertas ke ne necesas limigi la homaran populacion. Li skribis ke sufichus pli justa divido de la resursoj (tio ja estus necesa), sed li ne komprenis ke nia Tero havas limigitan spacon - kaj jam nun la homaro pli kaj pli minacas la aliajn viv-estajhojn (lau kristana kredo la „kreitaro“).

= =

2020-06 **Savu abelojn kaj kamparanojn**

2020-01-09 Mi sendis chi-tiun peticion jam en Januaro – do, se vi jam subskribis – bonvolu ne fari denove. Vi certe legis plurfoje ke multaj insekto-specioj tutmonde malpliighadas pro diversaj kauzoj:

Intensa kaj monokultura agrikulturo kaj ghardena kultivado kiu uzas pesticidojn, uzado de la grundo por domoj kaj stratoj, trafiko kaj lumoj, kemiajhoj en la chiutaga vivo.

Nuntempe EU debatas pri la agrikultura politiko de la sekvaj 7 jaroj; pro tio nun necesas instigi la parlamentanojn al shanghoj.

Jen peto subteni chi-tiun ECI por savi abelojn kaj aliajn insektojn kiuj fekundigas multajn plantojn au tiaj kiujn ni ne vidas char ili vivas en la humusa grundo, kaj samtempe shanghi la manieron subteni la kamparanojn. Ni krome ne forgesu, ke multaj birdoj vivas de insektoj; digna homa vivo bezonas integran reton da vivajhoj, kiu inkluzivas insektojn.

Chi-tiu ECI postulas: „Savu abelojn kaj kamparanojn“

1. redukti la uzadon de sintezaj pesticidoj, komencante per la plej dangheraj substancoj, kaj redukti la kvanton je 80% ghis 2030; kun la celo entute ne plu uzi tiajn ghis 2035.

2. reaktivigi la ekosistemojn sur kampoj, por savi la biodiversecon.

3. reformi agrikulturon, doni prioritaton al malgrandaj bienoj kiuj kulturas tre diverse; subteni la neutralan edukadon de kultivistoj sendepende de industria influo, cele al organika agrikulturo sen sintezaj (t.n. sistemaj) pesticidoj kaj sen genteknike modifitaj plantoj.

ECI validas nur por civitanoj ene de EU, pro tio la subskribo estas iomete pli kompleta ol aliaj pet-subskriboj:

Jen la ligo, kie vi povas elekti inter la jenaj lingvoj: de, en, es, fr, it:

www.savebeesandfarmers.eu/eng/

2020-06-10 **de dezerto returne al verda pejzagho: Al Baydha - Saudi-Arabio**

Instalo de Regajnebla Agrikulturo en dezertita tereno 50 km sude de Mekka – 8 jara laboro necesis por regajni la originalan pejzaghon – savano. Tiu ighis dezerto char homoj ekde la 1950-aj jaroj forhakis la arbojn. Neal Spackman estis petita de 2 saudi-arabaj princinoj kaj subtenita de ili regajni la tipan savanan pejzaghon.

Filmeto – dank al informoj de European Green Party (angle): www.youtube.com/watch?v=T39QHprz-x8

Jen la firmao kiu organizas tiajn projektojn: www.regenerativeresources.co/

Tie vi trovos pliajn filmetojn pri regajnebla agrikulturo; ekzemple:

www.youtube.com/watch?v=6vQW8TI_KLc

Kaj jen similaj klopodoj de la israela KKL re-verdigi la Negev-Dezerton:

www.youtube.com/watch?v=jDjW8WvFcGQ

- - -

2020-06-08 **Peticio - Brazila prezidento al internacia jughkortumo Den Haag**

la politiko de de Bolsonaro forhaki pli kaj pli de la brazila pluarbaro, malhelpi al indighenoj havas severajn sekvojn. La klimato de Brazilo ighos pli seka, sovaghaj bestoj ne plu havas biosferon por vivi, indighenaj triboj estas pli kaj pli endangherigataj de reduktado de ilia vivsfero, de oro-ekspluatantoj kiuj importas malsanojn (kronviruson) kaj poluas riverojn kaj grundon per cianido au hidrargo. FUNAI ne plu povas helpi sufiche bone al la indighenoj, char la prezidento ne volas tion – reduktis la fonduson.

Pro tio mi (kaj jam pli ol 200.000) subskribis la peticion de subtenantoj de pluarbaroj – sendi Bolsonaro al la Internacia Jughkortumo den Den Haag pro genocido rilate la 300 indighenaj triboj.

– trovebla en diversaj lingvoj:

www.rainforest-rescue.org/petitions/1216/prosecute-brazilian-president-bolsonaro-for-genocide

www.regenwald.org/petitionen/1216/bitte-unterschreibt-gegen-den-voelkermord-durch-bolsonaro

Sur tiuj retejo vi trovas plurajn peticiojn, chiu rilatas al grava problemo: kashita ligno-eksporto de valora Palisander ligno el Ghano

- - -

2020-06 **Rusio neglektas la borealajn arbarojn – Amur Tigro bezonas helpon**

Filmo de GEO montris la vivon de tiu plej granda inter la tigroj. Pozitive estas ke luanto de giganta areo devas zorgi por la nutrado de la tigroj – fakte oni nutras ekz-e aprojn, kaj tiujn povas kapti la tigro.

Negative estas ke la registaro malmulte kontrolas la eksporton de arbo-trunkoj al P.R.Chinio; char la aproj bezonas la fruktojn de kverkoj kiel baza mangho. Krome se mankas arboj la tereno sekighas kaj tiel pli ofte brulos la arbaroj – diabla cirklo komencighas. Sekve de tio la tigroj devas trovi alian manghon – kaj vizitos la kamparanojn, kaptos hundojn au brutaron.

Filmo estas videbla ghis la 22-a de Junio 2020: www.arte.tv/de/videos/078702-014-F/geo-reportage/

= =

2020-06-2 **Rimedo kontrau la Korona-viruso SARS-CoV-2**

antau 2 monatoj mi skribis la jenan pri esperinda medikamento kontrau la kronviroza malsano COVID-19.

„Espereble vi sukcesis eviti la Korona-viruson (teni distancon, lavi la manojn, ne tushi la vizaghon, tushi en tukon, preni maskon se oni iras al loko kie estas multaj diversaj homoj). Krom diversaj konsiloj interesa: Chloroquin (Resochin (Bayer)) - malnova medikamento kontrau Malario - povas kuraci gravan Kronviruso-atakon. Ghis nun mankas la formalaj pruvoj – sed ekzistas raportoj de sanigitaj homoj.“

Intertempe montrighis ke en Lancet aperis kazo-kolekto, kiu montris ke eble pli da homoj mortis. Mi jhus audis intervjuon kun Peter Kremsner, universitata kliniko Tuebingen, Germanio. Li gvidas 2 studojn pri Hydroxychloroquin – kiu momente pauzas. Li diras ke tiu medikamento estas malbone por la koro de homoj kiuj havas plurajn aliajn malsanojn kaj regule prenas plurajn medikamentojn. Li diras ke esperebleje la venonta semajno povas daurigi la studojn. Li diras ke tiu medikamento pro tiuj kromefikoj supozeble nur taugos por homoj kiuj ne havas aliajn malsanojn. Do, necesas atendi al la daurigo kaj fino de liaj studoj. Jen la intervjuo – en la germana: www.deutschlandfunk.de/forschung-aktuell.675.de.html

Alia ebla medikamento estas Gepon au Hepon, delonge konata en Rusio, oligo-peptido konsistanta i.a. el 14 aminoacidoj: avexima.com/medicines/hepon/

Ankorau mankas studoj pri tiu medikamento – eble niaj rusaj legantoj povas diri ion, chu ghi estas uzata kontrau la nuna kronviruso ?

Lau la datumo-kolekto de Johns-Hopkins: Rusio montras chirkau 1% da mortoj pro tiu kronviruso. Oni povas kompari kun 6% en Usono.

Certe la metodiko de la statistiko estas ne la sama, tamen estas interesa diferenco.

2020-05-30 **dezertoj, sablo, mar-bordoj, ktp. - tutmonda minaco – ARTE.tv**

vi certe jam legis ke la uzeblaj rezervoj de utiligebla sablo reduktighas pli kaj pli. Ne chiu tipo de sablo utilas por specialaj celoj (ekz-e produkti betonon).

Konstruado, moderna rompanta nafto-elsuchado (angle „fracking“), kaj kreado de insuloj (Singapuro, Dubai) bezonas gigantajn kvantojn da sablo. La sablo de la dunoj de Saharo au sur la tereno de la araba duoninsulo ne taugas pro la faineco. Fosi sablon je la marbordoj je multaj lokoj ne plu eblas, char tie jam mankas sablo, kaj la maro forprenas chiujure plurajn metrojn de la bordo. Krome la fosado je la marbordoj detruas biosferon, kaj krome akcelas la perdon de marbordaj terenoj.

Alia tipo de erozio estas la dezertigo, kion oni klopodas haltigi diversmaniere; ekz-e plantante arbarojn je la rando de Taklamakan en P.R. Chinio. Pri la nova dezert „Aral Kum“ dezerto kie antaŭ 70 jaroj estis la Aral Maro vi povas vidi filmon je la 9a de Junio – informoj pri chi-tiu homfarita katastrofo vi povas legi en Esperanto sur nia retejo: verduloj.org/aral.htm

La filmoj: ARTE.tv (en pluraj europaj lingvoj) ekzistas pluraj filmoj pri tiuj temoj – simple serchu „erozio“ kaj „dezerto“ en via lingvo.

= =

2020-04-23 **ekologio, kolapsologio**

Dum la Korona-pandemio estas mallonga, forta ghenado de nia totala vivo (ghis oni evoluis taugajn vakcinon kaj medikamentojn); aliflanke la homaro mem (intence au ne-intence) kauzis plurajn katastrofojn kiuj restas dum jarcentoj au jarmiloj. Shanghai tutajn regionojn por havi pli grandan profiton, tio ne nur povas la kapitalismo, sed same kauzis la socialisma sistemo: Aral-mar, pluraj rivero-sistemoj, bruligi fosiliajn fuelojn, grandskala sen-arbarigo, dezertigo, monokultura agrikulturo kun t.n. sistemaj pesticidoj (kiuj mortigas ne nur la celitajn "pestojn" sed ankaŭ la bonajn insektojn kaj bonajn "trud"-herbojn kaj vivantaron en la grundo. Jen, chi-sube ekzemplo kiu temas pri utiligi lagunon - ekz-e la Sasyk-laguno inter Danubo kaj Nigra Maro:

La aktuala "Sennaciulo 2020, 3/4" pritraktas la temon "Kolapsologio", do estas leginda por eviti kolapson de nia nun vivo-sistemo. Char AVE ankaŭ kunlaboras kun SAT, mi publikigis tie recenzon pri la libro "Collapse" de Jared Diamond; kiu estas tradukita al diversaj lingvoj - kaj ankoraŭ validas.

Do, ni engaghigu por eviti kontagion kun la viruso, kaj same grave redukti kontribuojn kiuj nutras la kreon de kolapso.

Bondezirojn, amike, manfred

2020-04-23 **Kiel trakti la maskon por shirmi kontraŭ virusoj**

Wolfgang Guenther informis: Kaj pensu pri tio:

Tuŝu/prenu vian memfaritan tol-maskon nur ĉe la fiksbendoj, kaj, kiam vi revenos kun la masko en vian hejmon, metu ĝin en skatoleton, ekz. en unu de tiuj tupper-ujoj. Poste lavu viajn manojn kaj desinfektu la maskon antaŭ ol vi denove ĝin surmetas, plejbone per kurta lavado je minimume 60 gradoj kaj posta gladado ĝis plena sekeco... Kaj ne forgesu: Restu sanaj, Wolfgang

Komento de AVE/mw: tia tola masko ne estas perfekta kompare kun speciala masko, sed helpas mutuale eviti la kontagion. Kiam vi estas inter pluraj nekonataj homoj indas kovri nason kaj bushon per tia masko. Ankoraŭ mankas studoj kiom longe "vivas" Korona-viruso sur la diversaj surfacoj (tolaj, metalaj, vegetajhoj, hauto; kaj ekz-e sub suno-radiado). Pro tio ne tushu la vizaghon (naso, okuloj, busho) per viaj fingroj kiam vi ne certas ke ili estas ne-difektitaj.

--

2020-04-23 **Sasyk-laguno – Nigra Maro - alia ekzemplo de homa eraro**

Eblas malkonstrui bar-digojn je riveroj por re-ricevi biosferajn regionojn. Tiaj digoj kutime ghenas la vojon de fishoj kaj en alia direkto la vojo de la transportita grundo, kiu restas malantaŭ la muroj.

Krome ghi haltigas la akvo-fluon, kiu influas la biosistemon.

Ni rememoras la iaman Aral-maron, kiun venkis la socialisma sovjet-sistemo; felice la malgranda norda parto povis esti savita dank' al Kasahio. Jen fotoj kaj la rakonto en Esperanto:

www.verduloj.org/aral.htm

Inter la Danubo kaj la Nigra Maro trovighis pluraj lagunoj. Oni (Sovetio) decidis uzi ilin kiel sistemo de kanaloj por ligi la Maron kun la Danubo*, Dnjestro kaj Dnjepro, kaj samtempe havi multe da akvo por akvumi la kampojn laulonge de la maro. 1978 oni baris la aliron de la Sasik-laguno al la maro; elpumpis la salan akvon kaj anstatauis ghin per dolcha akvo el la Danubo (tri-foje lau ilia teorio). Tio ne tute funkciis char sala akvo eniris tra la subgrundo. Tamen oni uzis la akvon por akvumi la kampojn (kutime stepa teritorio kun tre bona nigra grundo (Chernozem), kaj ankaŭ altigis la akvo-nivelon. Lau chi-sekva informo,

oni tro-saligis 30.000 hektaroj kiuj nun ne plu taugas por plejmulto de kulturoj; krome oni perdis la vivantan ekosistemon kiu altiris eko-turistojn.

Jen detala informo (en la angla): <https://pulitzercenter.org/reporting/failed-soviet-irrigation-project-brings-eco-apocalypse-sw-ukraine#slideshow-3>

Jen video pri la historio en la angla (4:21 minutoj): www.rferl.org/a/ukraine-sasyk/30101468.html

*) Komento AVE/mw: mi rememoras raporton de Tatjana Auderskaja pri la ekologiaj problemoj pro la kanaliĝo de la meza fluo (rapida/bystra ?) de la Danuba delto, kiu estas parto de tiu sistemo.

= =

2020-04-02 **Rimedoĵ kontraŭ la Korona-viruso**

Esperable vi sukcesis eviti la Korona-viruson (teni distancon, lavi la manojn, ne tushi la vizaghon, tusi en tukon, preni maskon se oni iras al loko kie estas multaj diversaj homoj). Krom diversaj konsiloj interesa: Chloroquin (Resochin (Bayer)) - malnova medikamento kontraŭ Malario - povas kuraci gravan Kronviruso-atakon. Ĝhis nun mankas la formalaj pruvoj – sed ekzistas raportoj de sanigitaj homoj.

Ghenerala konsilo por eviti tiajn virusojn: ne manghi viandon de sovaghaj bestoj (simioj, flug-mamuloj, k.a.) ĉar tiuj havas plurajn virusojn en si – kaj tiamaniere kontagho kun nekonataj shanghighitaj virusoj eblas. Dankon al Herman Deceuninck: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Kronvirusoj>

(vidu: wikipedia.org - sed, ĉi-tiu informo pri Chloroquin ankoraŭ ne estas en la Esperanto-versio).

2020-03-27 **Korona viruso (Covid-19) montrus fortecon de EU**

La frakcio de Verduloj kaj Regionalistoj en la Europa Parlamento postulas pli solidaran politikon. Necesus komunaj financaj rimedoĵ por fronti la Korona-krizon. Tio signifas ke tuta EU prenos krediton (ĝhis 1 biliono (10^{12}) por financi efikajn san-rimedoĵ kaj helpi ponti la ekonomian truon, kiun kausas la decidoĵ fermi vendejojn, laborlokojn grandskale por bari la virusan etendighon. Krome ĝhi utilis por la rekonstruo de la ekonomio – sekvante la Parizan Klimato-decidoĵn kaj pli daurigebla ekonomio.

Tiu solvo bazighas sur la ideo de Francio kaj krome entenas demokratian decidon flanke de la EP rilate la EU-interna uzo. La re-pago de tiu komuna kredito okazu lau la procenta ekonomia forto de la unuopaj EU-landoĵ.

Komuna EU-kredito je malalta interezo utilis komune al tuta EU, kaj montrus ke EU vere ighis familio.

(lau informoĵ de Sven Giegold, MEP (de, en): sven-giegold.de

Komento AVE/mw: tiu krizo montris la bezonon eviti mallong-vidan ekonomian politikon. Tiom granda super-lando kiel EU ne nur apogu sin de plej malmultekosta produktado en aliaj partoj de la mondo, sed pripensu kion necesas produkti mem, eĉ se la kostoj estas pli altaj.

= =

2020-03-01 **Militaro hejtas la klimaton – ni rezignu imperialismon**

Lau esploro i.a. de britaj scienculoĵ publikigita en Royal Geographical Society la militaro kausas grandan kvanton da CO₂-eligoĵ. Oni kalkulis ke sole tiu de Usono kausas 5% de la tutmonda eligo, kaj estas pluraj aliaj Paradoksa situacio: la klimata varmigho kausas malpacon – sed batali militare akriĝas ĉi-tiun situacion.

www.heise.de/tp/features/Das-US-Militaer-einer-der-groessten-Klimasuender-in-der-Welt-4455925.html

Necesus multe pli da Rondaj Tabloĵ por redukti la krizoĵn, kaj da saghaj tumonde-pripensitaj decidoĵ en la komisioĵ de UN. Sed ankau necesus ke la homaro devas rezigni pri imperialismo (heredita de niaj pra-avoj) – preskau ĉiu lando okupighas en tiu direkto, sed la plej gravaj imperialismoĵ fontas el Usono, Ĉinio, Rusio, Europo. Paco fontas el justaj rilatoĵ – simpl eldiro, sed malfacile realigebla.

2020-03-01 **Pesticid-firmaoĵ damaghas al homo kaj naturo**

Public Eye kune kun Unearthed (de Verdpaco/Greenpeace) esploris la veno-kvanton da pesticidoĵ ĉe la plej grandaj entreprenoĵ: BASF kaj Bayer Crop Science (Germanio), Corteva Agriscience (nova nomo de Dow kaj duPont en Usono), FMC (Usono) und Syngenta (intertempe filio de ChemChina, kiu apartenas al la ĉina ŝtato). Kompreneble pesticidoĵ ĉiam mortigas iujn organismoĵn kaj estas dangheraj; sed kelkaj el tiuj efikas ankau tie kie oni ne celas ilian uzadon. Ekzemple ili mortigas abeloĵn kaj similajn insektoĵn; grandskale detruas la biodiversecon – unu el la kausoĵ de la malapero de birdoĵ. Ili povas kausi kanceron au aliajn san-problemoĵn ĉe homoj. Kelkaj estas longdauraj, kaj eniras en la aeron au grundakvon.

Aparte krime tiaj firmaoĵ agadas, produktante pesticidoĵn kiujn ili ne (plu) rajtas vendi en la propraj landoĵ, sed vendas en foraj, malfortaj landoĵ, kie la registaroĵ ne interesighas pri la sano kaj naturo.

Lau informoĵ en: (de) sonnenseite.com (serĉu „Agrochemie“), (de,en,fr) publiceye.ch/de/ ,

detale: unearthed.greenpeace.org/2020/02/20/pesticides-croplife-hazardous-bayer-syngenta-health-bees/

= = =

2020-01-20 **Libio – skeptiko kaj espero**

Post la Libio-konferenco en Berlino eblas esperi lau la kunsentitaj temoj; sed lau la longjaraj spertoj restas pli alta skeptiko. Chiu el la partoprenintaj registaroj havas alian intereson. Se Putin sukcesos bridi Erdogan, kaj se oni trovas interkonsenton kaj pri komuna regado de tuta Libio kaj pri la fosiliaj resursoj sub la mar-fundo – prefere kune kun la forgesita Grekio, tiam eble realighos la espero. Ni ne forgesu, ke estis Usono kiu incitis la malpacon en Libio post la elpovigo kaj murdo de la prezidento Gaddafi (Oktobro 2011). Estus granda sukceso por la renomo de Putin. Kial ne fondi komunan mediteranean projekton? Sed oni ne forgesu ke fosiliaj energi-fontoj hejtigas la klimaton!

Do, post interkonsento eblas prefere investi en sunenergiajn teknikojn en norda Afriko.

Sen interkonsento – chu sekvus milito same kiel en Sirio – terura pensajho!

= =

2020-01-17 „**Mercosur**“ - klimato-protesto el **EU-Parlamento**

Sven Giegold informis ke tiu kontrakto inter EU kaj kelkaj sudamerikaj landoj (Argentino, Brazilo, Urugvajo kaj Paragvajo) kontrauas la promesitan celon de EU atingi klimatan ekvilibron ghis 2050 char ghi pligrandigos la produktadon de viando bio-etanolo, k.t.p.. Unuflanke tio kauzos plian grandskalan senarbarigon en Amazonio kaj krome malpli severajn kontrolojn pri pesticidoj kaj GMO de agrikulturaj importoj.

La chapitro Daurigeblo havas libervolan karakteron, fakte ne gravas. La Verda Frakcio preparis 2 studojn pri tiu temo kaj la EP akceptis – okaze de voĉdonado al „EU Green Deal“ - ke la chapitro Daurigeblo devas esti deviga en estontaj kontraktoj. Ni esperas ke almenau la nova „turkiz-verda“ koalicio en Austrio malakceptos la Mercosur-kontrakton.

Jen la ligoj al la studo organizita de Anna Cavazzini: <https://www.annacavazzini.eu/?p=1837>

kaj pri la agrikulturaj sekvoj de Martin Häusling: <https://www.martin-haeusling.eu/>

= =

2020-01-09 **savi abelojn kaj kamparanojn - Europa Civitana Iniciativo**

Vi certe legis plurfoje ke multaj insekto-specioj tutmonde malpliighadas pro diversaj kauzoj:

Intensa kaj monokultura agrikulturo kaj ghardena kultivado kiu uzas pesticidojn, uzado de la grundo por domoj kaj stratoj, trafiko kaj lumoj, kemiaĵoj en la chiutaga vivo.

Nuntempe EU debatas pri la agrikultura politiko de la sekvaj 7 jaroj; pro tio nun necesas instigi la parlamentanojn al shanghoj.

Jen peto subteni chi-tiun ECI por savi abelojn kaj aliajn insektojn kiuj fekundigas multajn plantojn au tiaj kiujn ni ne vidas char ili vivas en la humusa grundo, kaj samtempe shanghi la manieron subteni la kamparanojn. Ni krome ne forgesu, ke multaj birdoj vivas de insektoj; digna homa vivo bezonas integran reton da vivajhoj, kiu inkluzivas insektojn.

Chi-tiu ECI postulas: „Savu abelojn kaj kamparanojn“

1. redukti la uzadon de sintezaj pesticidoj, komencante per la plej dangheraj substancoj, kaj redukti la kvanton je 80% ghis 2030; kun la celo entute ne plu uzi tiajn ghis 2035.

2. reaktivigi la ekosistemojn sur kampoj, por savi la biodiversecon.

3. reformi agrikulturon, doni prioritaton al malgrandaj bienoj kiuj kulturas tre diverse; subteni la neutralan edukadon de kultivistoj sendepende de industria influo, cele al organika agrikulturo sen sintezaj (t.n. sistemaj) pesticidoj kaj sen genteknike modifitaj plantoj.

ECI validas nur por civitanoj ene de EU, pro tio la subskribo estas iomete pli kompleta ol aliaj pet-subskriboj:

Jen la ligo, kie vi povas elekti inter la jenaj lingvoj: de, en, es, fr, it, pl:

<https://act.wemove.eu/campaigns/rettet-die-bienen>

--- fino ---